

Oficiala organo de Oomoto kaj Ĵinrui Aizen-kai (UHA)

Oomoto

n-ro 458
2011
jan.-dec.



Memora Entrepreno por la 120-jara Jubileo de la Fondiĝo de Oomoto (3)


Oomoto celebros la 120-jaran jubileon de la fondiĝo en la venonta jaro 2012, kaj por jubilei tion Oomoto finkonstruis novan preleghalon.

En la lastaj jaroj, en nia revuo Oomoto #456 kaj #457, ni raportis pri la unuaj partoj de la entrepreno. Ĉi tie ni raportas pri la posta progreso de la entrepreno: la konstruo de la nova preleghalo komplete en decembro 2011.

En la unua de januaro 2012, oni komencos la prelegojn pri la instruo kaj historio de Oomoto en tiu ĉi halo.







Helpotrupoj el Oomoto al la atakita regiono de la granda tertremo en Orienta Japanio

Granda tertremo atakis la orientan parton de Japanio en la 11a de marto. Laŭ la lasta raporto la nombro de la viktimoj estas 19,486 personoj: 15,839 personoj mortis, kaj 3,647 personoj perdiĝis.

Oomoto sendis la helpotrupon al la atakitaj regionoj tuj en la vespero de la tago, kaj daŭre sendis dek trupojn por helpi la suferantojn, alporti helpomaterialojn kaj servi varmajn manĝojn.

Ĉiumatene la stabanoj de la Oomoto-Centroj en Ajabe, Kameoka kaj Tokio kunsidas por la matena kunveno, en ĉiu matena kunveno ni daŭre

o f e r a s
preĝojn por
la restaŭro
d e l a
damaĝitaj
regionoj
kaj por la
sekuriĝo
de nukleaj
centraĵoj.









Oomoto Diservo en Centro de Tao-Juan

La spirito de Kunfondinto DEGUĈI Onisaburo estis apoteozita okaze de la jubileo de la fondiĝo de Universala Homama Asocio.

Okuwaki Toshiomi

De la 8a ĝis la 13a de junio, 2011, Oomoto organizis la karavanon adorviziti Tajvanon memore al 80jara jubileo de la fondiĝo de Tajvana filio de Oomoto kaj 60jara datreveno de la fondiĝo de Tainan-filio de Tao-Juan. La Kvina Spirita Gvidantino DEGUĈI Kurenai kun cent kvin Oomotanoj vizitis Tajvanon. La karavananoj solenis Oomoto-Diservon por mondpaco en la Centro de Tao-Juan, kiu situas en urbo Taipei, kaj en la Tainan-filio de Tao-Juan. Kaj ili vizitis la lokojn, kie Tajvana filio de Oomoto kaj Keelung-filio de Oomoto troviĝis. Krome, ili vizitis la lagon "Ri yue tan (sunluna lago)" kien antaŭ 80 jaroj ankaŭ DEGUĈI Onisaburo, la Kunfondinto de Oomoto, vizitis. La spirito de Kunfondinto DEGUĈI Onisaburo estis apoteozita en ĉiuj filioj de Tao-Juan en Tajvano.

En la 8a de junio, karavananoj de Tajvana Banko. Atinginte tien, atingis la flughavenon *Toen* ĉiuj voĉlegis la preĝvorton "Amacunorito". Post tio, la karavananoj vizitis la vilaan ejon nomatan la ceremonio por elformi la karavanon. Poste ili per tri busoj "Reisenkjo (spirit-fonta ĝardeno)", kie vizitis la lokon, kie la Tajvana filio la Kunfondinto DEGUĈI Onisaburo de Oomoto estis. Nun en la loko kaj lia edzino, la Dua Spirita troviĝas la trejnejo por la oficistoj Gvidantino, DEGUĈI Sumiko, loĝis



je la vizito. Tiam li donis la nomon al la domo de kredanto de Oomoto. La karavano rekonis la monumenton de "Reisenkjo" kaj akvofalon de "blanka drako". Poste ili vizitis la ŝtatan muzeon *Gugong* kaj vespermanĝis en la restoracio en la urbo *Taipei*. Ĉiuj tranoktis en la hotelo situanta najbare de Centro de Tao-Juan.

La 9a de junio estas la memora tago de fondiĝo de Universala Homama Asocio. DEGUĈI

Centro de Tao-Juan en Taipei

Onisaburo fondis ĝin en 1925. La Centro de Tao-Juan situas en la plej supera etaĝo de sia alta konstruaĵo en la centro de la urbo *Taipei*. Je la kvarono antaŭ la deka atm, la Ĉefmajstro de Tao-Juan, KJO Gado esprimis la bonvenan saluton. La Tao-Juan stila ceremonio por apoteozis la spiriton de Kunfondinto DEGUĈI Onisaburo, al la altaro de la Centro de Tao-Juan komenciĝis. Unuafoje

apoteozigis la spirito de Kunfondinto en la Tao-Juan de Tajvano. Estas mirakle, ke tio okazis ĝuste en la tago de la fondiĝo de UHA. Oni solenis la ceremonion samstile por la fondintoj de Budhismo, Kristanismo, Islamo, Taoismo kaj Konfuceanismo. Dum la ceremonio TAGA Norijuki, la Ĉefdirektoro de Oomoto, voĉlegis la preĝvortojn en japana lingvo. Poste, la Kvina Spirita Gvidantino faris teceremonion kaj oferis japanan verdan teon al la plej supera Dio

de Tao-Juan kaj al la spirito de Kunfondinto de Oomoto.

Oomoto-Diservo por mondopaco sekvis solene. La Oomoto-Diservo antaŭ la plej supera altaro en Centro de Tao-Juan okazis unuafoje. La Ĉefmajstro KJO Gado kaj Ĉefdirektoro de Tao-Juan, ĈIN Ŝiŭa, oferis la pinbranĉeton en la ceremonio. Ĉiuj partoprenantoj voĉlegis la preĝvorton "Kamigoto",

Tainan-Templo de Tao-Juan





kion la Spirita Gvidantino gvidis. Post la diservo ili memorfotiĝis. Tagmanĝinte, ĉiuj karavananoj voĉlegis la specialan sutron nomatan “Ĉinkaho”.

Poste, speciala sankta ceremonio, *Hu-ĉi* (aŭtomatika sankta skribado de Dio) okazis. Al estraranoj de Oomoto kaj UHA, posteno de Tao-Juan estis donita. Kaj la aŭtomatika sankta pentrado de Dio estis farita. Je

Insulo Lалуu

la 18a kaj duono gratula kunveno organizite de Tao-Juan komenciĝis en la hotelo Ambassador Taipei. Salutis Ĉefmajstro de Tao-Juan KJO, kaj Ĉefdirektoro de Tao-Juan Ĉin, la Spirita Gvidantino de Oomoto DEGUĈI Kurenai. Karavananoj de Oomoto prezentis la kanton, la himnon de Oomoto. Fine la Ĉefdirektoro de Oomoto, TAGA Norijuki, esprimis la dankajn vortojn.

En la 10a, la karavano vizitis la urbon *Keelung*, kie *Keelung*-filio de Oomoto troviĝis. Nun la loko estas parko. Poste, karavano turismis la distrikton “*Jiufen*” kaj tagmanĝis. “*Jiufen*” estas konata de la modela loko por la animacia filmo “Sen to Ĉihiro no kami kakuŝi” (geknaboj Sen kaj Ĉihiro kaŝitaj de spirito). Ĉiuj per busoj iris al *Ri yue tan* (Sunluna lago) kaj tranoktis tie. Sunluna lago estas menciata en la sankta libro “Rakontoj el la Spiritaj Mondo” diktita de DEGUĈI Onisaburo. La lago estas la plej granda kiel sensala lago en Tajvano. La insulo *Laluu*, kiu situas en la centro de la lago, estas la sanktejo de indiĝena etno Sao. Multaj turistoj vizitas tien.

Karavananoj per 3 ŝipoj veturis al la insulo *Laluu* kaj tie preĝis per la preĝvortoj “*Amacu-norito*”. Poste, ili surteriĝis apud la templo *Xuan Guang* kaj turismis. Kaj ili grimpis la monton *Ar Long Shan* (du drakoj), kie la turo nomiĝanta “*Zion-turo*” (favora turo) troviĝas. La turo estas

ĉin-stila kaj 46 metrojn alta. Post preĝi per la preĝvorto “*Amacu-norito*”, ĉiuj grimpis la turon. Kaj ili iris al urbo *Kaohsiung* per busoj. Post vespermanĝo, ĉiuj ĝuis ŝipi en gulfo *Kaohsiung*, kiun la Spirita Gvidantino speciale donacis al karavananoj.

En la 12a, ĉiuj veturis al *Tainan*-filio de Tao-Juan per busoj. Ankaŭ ĉi tie oni solenis la ceremonion apoteozi la spiriton de DEGUĈI Onisaburo, kaj la Spirita Gvidantino oferis la japanan verdan teon al la altaroj de Dio kaj la spirito de la Kunfondinto. Solene sekvis la Oomoto-Diservo por mondopaco. Post la memora foto, ĉiuj havis bonvenigan kunvenon en la gratulkunvenejo. Tie la Ĉefmajstro Kjo kaj la Spirita Gvidantino de Oomoto salutis. Karavananoj prezentis la himnon de Oomoto kaj en la fino, la Ĉefdirektoro de Oomoto, TAGA Norijuki, esprimis la dankemon. Karavananoj turismis en la urbo *Tainan*. Reveninte al la urbo *Kaohsiung*, ili vespermanĝis en la restoracio de la altega konstruaĵo.



Hu-çi en Taipei Centro

En la 13a, ili turismis en la urbo *Kaohsiung*. Poste, ili veturis per kugla trajno de la stacidomo *Kaohsiung* al la stacidomo *Toen*. Tie ili havis la ferman ceremonion por karavano.

Al la flughaveno *Toen*, multaj Tao-Juananoj kun la Ĉefdirektoro Ĉin, venis por ĝisrevidi. Ĉiuj karavananoj flugis de la flughaveno *Toen* al Japanio.

NAO DEGUĈI

Biografio de la Fondintino de Oomoto

2

Sakae OOIŜI, *tradukis Mathias DALMOSE*

Ĉapitro dua

Spiritaj songoj

Post la forpaso de Masagoroo, la familiaj provizoj elĉerpiĝis pro obstakloj sekvantaj obstaklojn ĉe la membroj de la hejmo. Joneko, la plej aĝa filino, kiu duafoje edziniĝis, al tiel nomita Ŝikazoo Oocuki de Niŝimaĉi en Ajabe, komencis en 1891 montri antaŭsignon de mensmalsano. Pri la filoj, la laŭintenca sinmortiginto Takezoo fine resaniĝis de sia vundo, sed rifuzis daŭrigi la trejnadon pri ĉarpento, kaj finfine forvadis kaj forestis deksep jarojn. Seikiĉi enlistiĝis en la armeon kaj je la eko de Sino-Japana Milito en 1894 estis sendita al Tajvano, kie li baldaŭ mortis en batalo. Denkiĉi, devigate adoptiĝis de la sama Oocuki kiu edziĝis al Joneko. Do,

la prospero de la familio estis senesperiga, sed kiam la hejma stato atingis sian plej malaltan malfluson, okazaĵoj ekŝanĝiĝis en neatenditan direkton.

Tio komenciĝis dum la nokto de la luna novjaro en 1892. Nao, tiam kvindekkvinjaraĝa, spertis misteran songon en kiu ŝi sin trovis en la mezo de vico da palacoj, multvicaj kaj belaj senimageble. Elektinte la palacon kiu ŝajnis esti la centrala, ŝi eniris tra la ĉefa pordego, kaj jen, sidante rektadorse sur trono, estis dieca estaĵo kun nobla aspekto kaj longa barbo. Nao, imponita pro la noblega aspekto de tiu dieca personeco, proksimiĝis kvazaŭ entrancigita. Levinte sian majestan figuron ĝis plena alteco, la dieca estaĵo prenis la manon de Nao kaj ŝin gvidis profunden en la palaco, kie ili atingis ŝtuparon gvidantan supren ĝis sanktejo. Suprenirinte sola laŭ la ŝtupoj, la dieculo ekkantis vortojn da preĝo kaj gvidis

Nao reen al la ĉefa halo.

Nao, ankoraŭ entrance eliris la palacon kaj sin turnis al kion ŝi perceptis la nordoriento. Tie, malantaŭ granda pordego, impone aperis palaco eĉ pli altruda ol la unua. Surtrone ene estis alia dieca estulo, kies noblegeco kaj brilegantaj ornamaĵoj tremigis Nao per solena timigo.

Tiu dieculo sin levis malrapide de sia trono kaj irante rekten al Nao fikse rigardis ŝian vizaĝon. Post la rigardado li revenis al sia trono senvorte. Nao, timegigita, kuris el la palaco kaj tra la pordego kiel eble rapide.

Ekstere, ŝi ekvidis alian imponegan palacon, en kiu ŝi trovis sian forpasintan edzon, Masagoroo. Forgesinte pri ĉio alia, ŝi kuris al li, kaj dum ili vigle parolis pri tempo pasinta, Nao ekvekiĝis de la sonĝo.

La sekvantan nokton kaj la sekvantan, Nao spertis similajn sonĝojn, kaj proksimume de tiu tempo, mistera aŭro ŝajne sin metis ĉirkaŭ ŝin.

La komenco de la spirita posedigo de Fondintino

La 3an de februaro, 1892, Nao vizitis sian filinon Joneko en Niŝimaĉi. Rjooko kaj Sumiko, tiam aĝaj dekunu kaj naŭ jarojn, restis hejme. Solaj kaj malvarmaj ili kuniĝis

ĉirkaŭ braĝa fajro, kaj parolante pri sia fratino en Niŝimaĉi, ili baldaŭ dormemiĝis kaj ekdormis. Ĉirkaŭ noktomezo ili ekvekiĝis ŝokitaj de laŭta voĉo krianta, "Sumiko! Rjooko! Malfermu la pordon!"

La voĉo estis de ilia patrino, sed neniam antaŭe ili aŭdis ŝin paroli per tiel laŭta kaj ordona tono. La du knabinoj kuris malfermi la pordon. Nao, kiu ekeniris la domon, malproksima de sia kutima ĝentileco, montris postulemon kia silentigus la diablon.

"Iru tuj al la domo de via fratino," ŝi ordonis, "kaj diru ke ŝi fajrigu tridekses kandelajn kaj ĉantu la nomon de la sankta sutro."

La konsternitaj knabinoj kuris nudapiede el la domo, tenante enmane siajn lignajn ŝuojn. Post kelktempa kurado ili haltis por kapti la spiron, kaj unu el la knabinoj diris, "Ŝi vere diris fajrigu tridekses kandelajn kaj recitu la nomon de la sankta sutro, ĉu ne?"

"Kio dirigus al ŝi tion?"

"Ĉu vi kredas ke ŝi perdis la prudenton kiel Joneko?"

"Kion ni faru se Panjo ankaŭ freneziĝas?"

Alveninte al la hejmo de Oocuki, ili peris la mesaĝon de Nao al Oocuki kaj sia fratino. Oocuki al si murmuris, "Ŝajnas ke ilia patrino finfine freneziĝis," kaj al la knabinoj, "Bone, bone. Iru hejmen kaj diru al via patrino ke ŝi ne zorgu. Joneko fajrigos la

kandelojn kaj pretigos por ĉanto de la nomo de la sutro.”

La knabinoj eliris la domon de Oocuki kaj reiris hejmen. Sed ilia patrino estis nenie trovebla. Maltrankvile serĉante en la domo, la du knabinoj trovis la vestaĵon de sia patrino en unu el la ĉambroj. Aŭdinte bruon de ekstere ĉe la puto, ili iris rigardi, kaj tie, en la frosta vetero, ilia patrino banis sin per siteloj da glacieca akvo.

Kiam Nao revenis al la domo, la knabinoj raportis, “Ni iris al Niŝimaĉi kaj diris kion vi ordonis.”

“Tre bone,” respondis ilia patrino. “Vi certe frostas. Pli bone ke vi enlitiĝu por ke vi ne malvarmumu.” Ĉifoje estis la kutime ĝentila, dolĉa voĉo de ilia patrino, kaj la knabinoj iris dormi tre trankviliĝintaj.

Ekde tiam, la glaciecaj sinlavadoj de Nao okazis ĉiuvespere, kaj nevidebla spirita ĉeesto ŝin eniris kaj eliris intermite. Tiu ĉeesto ŝajnis eliri kun granda forto el la centro de ŝia stomako, kaj Nao komencis muĝi per granda voĉo kiu ne estis ŝia propra. Per sia propra ĝentila voĉo ŝi respondis aŭ demandis kaj la spirito muĝis responde. Tiel ĉi Nao kaj la spirito ŝin posedanta daŭrigis strangan dialogon, kaj tiel komenciĝis la posedigo de Fondintino.

Nao estis tute konscia kiam la spirito eniris ŝin. Unue ŝia korpo eksterordinare peziĝis, kaj ŝi sentis grandan forton en sia ventro. Tiam ĉiom da laceco ŝin forlasis kaj

ŝia pozo rektiĝis kiel ŝtona statuo. Ŝia korpo komencis balanci antaŭen kaj malantaŭen kaj ŝi levis kaj mallevis siajn piedojn intermite. Tiamomente ŝia mentono estis tiritita malantaŭen, ŝiaj okuloj brilis, kaj per grandega premo de la centro de la stomako, la voĉo eliris per solena tono.

Nao, al kiu ne plaĉis tiu muĝado per laŭta maskla voĉo, de tempo al tempo fiksfervis la makzelon, decidinte ne paroli. Vane. La granda voĉo ekeliris malgraŭ tio, perforte malfermante ŝian buŝon.

Nao demandas al la spirito

Kiam Fondintino unue eniris tiun staton de spirita posedigo, ŝi surpriziĝis kaj ekmaltrankviliĝis pro kio al ŝi okazis, kaj nur deziris forigi la entrudiĝulon. Ĉar tio montriĝis neebla, ŝi fine akceptis kaj komencis demandadi al la spirito pri kiu kaj kio li estas.

“Kiu vi estas?”

“Mi estas Uŝitora no Konĵin.”

“Certe vi klopodas min trompi.”

“Mi estas Dio. Dio ne mensogas.”

“Ĉu vere vi estas tiel grandioza dio? Kiel mi povas esti certa ke vi ne estas nur vulpo aŭ melo?”

“Mi estas nek vulpo nek melo. Mi estas la dio

kiu rekonstruos la mondon.”

Post ripeta demandado, Nao devis konkludi ke ŝi vere estas posedata de ia formo da dieco. Ŝi ankaŭ ekkomprenis ke ŝia vivdaŭra suferado estas antaŭdecidita kiel provo, purigado de korpo kaj spirito prepare ŝin uzi kiel kompetentulon laŭ la dia plano, kaj ŝi sinrezignis por kompleta obeado al la volo de la spirito.

Antaŭ atingi tiun konkludon, ŝi tamen laŭ sia zorgemo, zorgis ke ŝi povus konduki la homaron al devojiĝo per tiuj asertoj pri “la rekonstruo de la pli granda mondo”. Kaj tial ŝi konsultis pastrajn mediumojn kaj diversspecajn okultistojn, por ekzameni la spiriton kaj pritaksi ĝian aŭtoritatecon.

La takso de la abaka divenisto

Iuokaze, Nao aŭdis ke en loko nomita Oro en Kimimura, loĝas viro kiu antaŭdiras uzante japanan abakon, kaj kiu estas fama pri forpelo de demonoj. Tuj kiam ŝi aŭdis pri tio, ŝi ekiris al Oro.

Nao opiniis tion stranga, ke la posedanta spirito elektis tian analfabeton kiel ŝi, por konigi pri lia dia volo. Kaj eĉ se la posedanta spirito vere estis tiel grandioza

spirito, ŝi, zorgoplena pri kiel akiri manĝon, apenaŭ estis en stato sin dediĉi al tiel gravega tasko. Cetere, ŝi kaŝe deziris forigi tiun timigan estaĵon kiel eble plej baldaŭ.

En Oro la divenisto demandis al Nao pri ŝia naskiĝdato kaj aliaj detaloj, kaj fingrumis la abakon. Subite li levis la kapon kun esprimo de surprizegiĝo.

“Nao!” li diris. “Tio ĉi estas absolute nekrebebla! Kiel vi intencas konstrui sanktejon por enhavi kaj honori tiel potencon diecon? Tio postulus la forton de la imperiestro kaj lia tuta stabanaro.

En la manoj de potenca spirito kiel tiu ĉi, se vi ĉirkaŭiras dirante ĉiajn aferojn, homoj pensos ke vi estas freneza. Pli bone se vi lasas min ensigeli ĝin.” Tion dirinte, li faris etan skatolon el blanka ligno, kaj donante ĝin al Nao, diris “Metu tiun ĉi sur vian familian altaron hejmenveninte.”

Nao portis la skatolon hejmen kun granda zorgo, kaj kiam ŝi metis ĝin sur la hejman sanktejon, la skatolo surfalis la teran plankon. La voĉo de la spirito ektondris.

“Nu, mi vere kreis multajn obstaklojn por vi! Tiu certe estas la plej bona divenisto en Japanio. Sed mi ne estas tia malforta spirito kia impresiĝas per tiel malgrava sorĉumo. Ne estas la unua fojo ke li min ensigelis. Antaŭ longe li estis unu el tiuj kiuj laŭpostule min enŝlosis en la nordoriento. Do estas lia karmo provi denove, sed li neniel sukcesas ĉifoje.”

Ĉirkaŭ semajnon poste, Nao, zorgante pri la divenisto, reiris al Oro por ekscii kiel li statas. Kiam ŝi alvenis, ŝi vidis funebrosignon ekster lia domo kaj najbarojn haste enen kaj eksteren irantajn. Demandinte al unu el la funebrantoj pri kiu estas la mortinto, ŝi eksciis ke la divenisto komencis suferi stomakodoloron kaj poste fortajn doloratakojn, post enŝloso de iu forta spirito proksimume antaŭ semajno, kaj la pasintan nokton, vane uzinte medikamenton kaj konsultinte kuracistojn, mortis. Nao ekploris.

Dum ŝia serĉado de respondoj pri la problemo, la Fondintino iris al pastraj medioj fore kaj vaste, kaj ankaŭ vizitis sanktejojn en Jagi, Ŝimabara, Osaka, kaj Fukuĉijama. Sed kien ajn ŝi iris, neniu povis klarigi al ŝi kio estas la spirito posedanta ŝin.

Miskompreno

Dum dek tri tagoj post la unua ekposediĝo, Nao vivis senmanĝe, kaj sepdek kvin tagojn ŝi ne rajtis dormi. Dume ŝi kriis avertojn al homoj, urĝigante al ili ŝanĝi sian koron, sed la homoj nur taksis ŝin freneza.

En tiu tempo estis en Ajabe oftaj ekfajroj, evidente fare de fajrigemulo, sed la kulpulo ĉiam sukcesis eskapi la aŭtoritatojn. Finfine entrepreno de konstruligna

komercisto en Senda estis forbruligita, kaj la najbaroj rememoris ke Nao, dum posedata stato kriis, "Se vi ne ŝanĝos vian koron baldaŭ, oni ne scias kien flugas la fajreroj."

Pro tio, la najbaroj informis pri Nao al la polico, kiu ŝin venigis al prizono por pridemando. Dume, la efektiva kulpulo estis kaptita, kaj Nao liberigita, sed la najbaroj, konsilite de la polico, kune faris malgrandan malliberejon, kie la "frenezulino" estis tenita.

La taskon gardi la malliberejon ekplenumis ŝia bofilo, la spiteza Ŝikazoo Oocuki, kiu strikte gardis, nur lasante al ŝi la plej aĉan nutraĵon. Nao deziregis eskapi, sed trovis sian gardatecon tro strikta kaj pro senespero ŝi eĉ konsideris sinmortigon. Pro tio la voĉo de la spirito denove aŭdigis sin.

"Vi ne mortu! Via vivo estas tre grava pro la grandega tasko atendata de vi. Estu pacienca, kaj mi liberigos vin en la punkto de la plena luno. Se vi ĉi tie mortos je rifuzo de miaj ordonoj, via spirito restados en tiu ĉi ĉelo, kvazaŭ ĝi neniam estus forlasinta vian korpon."

Do, kiom ajn ŝi deziris morti, eĉ tia eskapo estis al ŝi malpermesata.

La komenco de la skribaĵo

Kiam ankoraŭ en mallibero, Nao

petis al la spirito, “Se mi daŭrigas tiel ĉi, muĝante per laŭta voĉo, homoj nur taksas min freneza, kaj cetere doloras tiel laŭte krei. Ĉu estus eble konatigi vian imponan volon alimaniere?” La voĉo responde ordonis al ŝi preni skribopenikon. Sed estis neniu peniko en la ĉelo, kaj eĉ se estus, analfabeta Nao ne povus skribi eĉ unu vorton.

Nao hezitis, sed la voĉo parolis denove: “Ne estas vi kiu skribos. Mi skribigos vin, do prenu la penikon kaj forgesu vian dubon.” Nao ĉirkaŭrigardis. Ŝi ekvidis najlon kaj prenis ĝin. Surprize, ŝia mano komencis moviĝi per si mem kaj gratis vortojn sur kolonon – vortoj kiujn la analfabeta Nao ne povis legi.

Tio estis la komenco de la skribaĵo de Oomoto, kiu estis nomata Fudesaki, signifante “la pinto de la skribopeniko”. Poste, Nao skribadis grandkvante sur decan paperon per peniko kaj inko, atingante je sia morto en 1918, proksimume ducent mil paĝojn, el kiuj ŝi neniam kapablis legi iun ajn parton.

Enhavo de Fudesaki

Fudesaki estas skribita nur per ronda kanao (silaba skribo). La skribostilo estas preskaŭ senarta, kaj por nespecialisto aspektas vere senlerta. Sed specialistoj admiris ĝin, konsciigante pri similaĵoj kun la

senornama kaj fortoza, natura skribo de la Ses Dinastioj (AD 222-589) de Ĉinio.

Nao skribis Fudesaki per malgranda peniko de malbona kvalito, malmultekosta inkŝtono kaj kruda inko. Ĉar estis spirita forto kiu gvidis ŝian penikon, kaj ne Nao mem, ŝia analfabeteco, maljuniĝanta vido kaj manko de adekvata lumado, neniel povis obstakli la fluon da vortoj.

La literatura stilo de Fudesaki estas decidema, tradaŭre sen iaj ajn demandemaj frazoj aŭ hezitemo. Sekvante, kelkaj frazoj de la komenco de la verkaĵo:

Ĉiuj mondoj samtempe disvolviĝas kiel umefloroj. Mi, Uŝitora no Konĵin, estas veninta por finfine regi... Sciu, ke tiu ĉi mondo estas mondo de brutoj, la fortaj predas la malfortajn, faraĵo de la diablo. Ho, via mondo da brutoj! Malbono tenas vin per tia kontrolego ke viaj okuloj estas blindigataj pri ĝia senmoraleco – malluma epoko, sendube. Se lasita daŭri tiel ĉi, socio baldaŭ perdos la lastan restaĵon da harmonio kaj ordo. Tial, per manifestiĝo de dieca forto, ĉiuj mondoj trauros rekonstruadon, kaj ŝanĝiĝos en tute novan kreaĵon. La malnova mondo suferos plej rigoran purigadon por ke ĝi iĝu Ĉiela Regno, kie paco regados tra ĉiujn venontajn epokojn. Pretigu vin mem por la epoko de paco! Vi, filoj de homoj, restu pretaj! Ĉar la vorto de Dio ĉiam plenumiĝas...

(daŭrigota)

kvara parto

LA SPIRITA MONDO ESTAS LA ORIGINO DE EKZISTO

3

Hidemaru Deguči, tradukis Eizo Itoo

La fizika mondo estas rizbedo

Ne estas granda diferenco inter la spirita mondo kaj la fizika. Ĉio ekzistanta en la spirita mondo nepre aperas ie kaj iam en la fizika mondo.

La diferenco estas nur en tio, ke la spirita mondo estas super la tempo kaj la spaco, dum la fizika mondo estas limigita per ili. Tial eĉ la plej sekretaj aferoj de la spirita mondo nepre senescepte aperas en la fizika mondo, kvankam tio ne estas klare konceptebla ordinare.

En la mondo ekzistas neniu hazardaĵo. Kiam homo atente (spirite) observas sian temperamenton kaj la cirkonstancojn, homo povas pli malpli klare ekscii, en kia (spirita) regiono li nun troviĝas.

Ĉiu vorto aŭ ĉiu ago, kiun homo elmontras sen speciala intenco, senescepte estas pro konduko el la spirita mondo. Tial homo povas elkompreni la plej profundan mistikaĵon, nur se li dediĉas dece atentan observadon.

La fizika mondo estas la rizbedo por la Ĉielregno. Sed se diri nur pri la fizika mondo, la infanoj estas la plantoj de la homoj. Ĉiuj iliaj agoj estas modelfiguroj de la homa vivo. Ili konstruigas etdomon per lignopecoj, ili kurigas vagonaron ludilan, jen ili ludas gastigon, jen ili ĝojas per militludo. Ili vivas ĉiam farante imitaĵojn de la agoj de plenkreskuloj. Tre kredeble la penaĵoj, kiujn ni ŝvite faras per nia tuta saĝeco, estas ankaŭ nur modelfiguroj de la aferoj en la spirita mondo.

Ĉar la fizika mondo estas nur la bildo de la spirita mondo, se homo argumentas nur pri la aferoj de la fizika mondo, neglektante la spiritan mondon, li faras saman eraron kvazaŭ pridiskuti nur la branĉajn foliojn, ignorante la trunkon.

La moderna scienco, ĉar ĝi estas bazita sur la materia mondo, memkompreneble ne povas ampleksi la spiritan mondon. Kvankam kelkaj homoj provas etendi la limon de la scienco en la spiritan mondon, estas tre malfacile en la

nuna stadio pridiskuti la spiritan mondon, estante en la fizika mondo — eĉ pli malfacile, ol imagi la vintran veteron, efektive estante en somero. Ĉiuokaze mi nur deziras, ke homoj estu klare konvinkitaj pri la ekzisto de la spirita mondo, sed ne pli.

Gravas la spiritoj, sed tamen ni neniel devas ignori la fizikan mondon. La fizika mondo kaj la spirita mondo ekzistas post ĉio en rilato unueca. Ĉar efektive ni nun vivas en la fizika mondo, por ni la plej grava afero estas discipliniĝado kun kondutoj de la fizika mondo. Jes, ĝi estas nenio alia ol la celo de homa vivo.

La fizika mondo estas la reforĝejo por niaj animoj. Dank' al la bridilo — la korpo — niaj animoj ricevas necesan malliberecon por reĝustiĝo aŭ reforĝiĝo. Ĉar en la spirita mondo la animo libere iras respektive al la regiono responde al sia penso, ŝato aŭ karaktero, al ĝi estas malfacile sin disciplini.

Ankaŭ en la spirita mondo troviĝas loko, kie la animoj senigitaj je libereco, ricevas disciplinadon. Sed la animoj, tute liberigitaj de la korpo, estas multoble pli netaj, viglaj kaj impresiĝemaj tiel ke ili sentas treege grandan doloron pro nur malgranda senlibereco.

Tial homoj devas peni dum la vivado en la fizika mondo kiel eble sin forĝadi por reĝustigi malbonan inklinon.

La fizika mondo estas kreita tiel ke la cirkonstancoj estu plej konvenaj por forĝiĝo

de la animoj.

La fizika mondo estas loko, kie ĉio estas metita horizontale. Ĉi tie preskaŭ nerekonita estas rigora diferenco de la klasoj de la animoj, escepte nur kelkajn okazojn nepre necesajn por teni la ordon de la socio. Tro klare diferencigi la animklasojn en la fizika mondo spitas Dian volon. Ĉi tie la homoj, kunpuŝe metitaj tute egale sen severa klasigo, pli bone poluras sian animan karakteron kaj nur enirinte en la spiritan mondon, ili estas severe ordigitaj laŭ deca klasigo.

Ĉi tie en la fizika mondo homoj, kiuj povis iom post iom pli altigi la animan karakteron ĝis ekstremo, estas la finaj sukcesintoj aŭ venkintoj, sendemande, je kia tasko ili sin okupis.

Eksteraj scioj valoras nenion laŭ spirita vidpunkto

Pentraĵo estas por tiel diri muziko algluita sur plata surfaco. Tial ĝi estas tenata pli longe laŭ la tempo kaj pli klare laŭ la spaco, sed tiom pli ĝi montriĝas enua kaj truda.

Oni povus kompari la rilaton inter pentraĵo kaj muziko kun tiu inter la fizika kaj la spirita mondoj. Dum la unuaj estas horizontalaj, fiksitaj kaj limigitaj, la aliaj estas

vertikalaj, libere momentaj kaj senbridaj.

Kiel pentraĵo estas momenta parteto de muziko algluita sur plataĵo, tiel iu momento de la spirita mondo spegulita sur la loko tempe kaj space limigita estas la fizika mondo.

Alivorte la pentraĵo estas konkretiĝo de vortoj kaj la fizika mondo estas bildo de la spirita mondo.

Ekzemple imagu, ke iu, starante antaŭ pentraĵo, nur faras kalkulon, ke ĝi konsistas el tiaj kaj tiaj koloroj kaj el tiaj kaj tiaj linioj geometriaj. Idiota sensecaĵo! Sed la homoj, anstataŭ forridi, nur admiras kaj aplaŭdas, se la sciencistoj faras preskaŭ la samon, dissekcante kaj analizante montojn aŭ homajn korpojn kaj klarigante, ke ili konsistas el tiuj kaj tiuj elementoj kaj estas formitaj laŭ tiuj kaj tiuj fizikaj leĝoj.

Esence la homo estas dotita per intuicio por senti veron, bonon kaj belon. La homa tasko estas elmontri ĝian kapablon kaj pli kaj pli ĝin perfektigi. Ĉar la intuicio estas veninta el la spirita mondo, sed neniel akirita en la fizika mondo, oni ne povas ĝin pliriĉigi per scioj pri leĝoj de la naturaj fenomenoj fizikaj. Laŭ la puŝo el la spirita mondo la homo senkoscie iom post iom lernas la aferojn de la fizika mondo. Nur laŭ ekstera observo aspektas, ke nomo ion elkomprenas spirite pere de la objektoj en la naturo.

Post ĉio, la Dia leĝo estas ke okazu fluo el la spirita mondo en la fizikan sed

neniel estas permesita la inverso.

Simple anatomiaj aŭ analizaj scioj apartenas nur al la fizika mondo, sed neniel al la spirita mondo. Tial, homo kun nur tiaj scioj, devas postmorte eniri en la spiritan mondon nur kiel stultulo. Ni devas klopodi dum la fizikmonda vivado akiri enlumiĝon pri la vero, kiel eble pli eterneca kaj senlimeca. Se ne, kiom ajn multe da scioj aŭ rezonoj de la fizika mondo nenion helpas en la spirita mondo. Ilin alte taksas tamen homoj, kiuj konsideras, ke la homa vivo daŭras nur kvindek aŭ sesdek jarojn en la fizika mondo kaj poste neniigas. Terura eraro!

Sed homo rajtas sin okupi je kia ajn afero, se li ĝin ŝatas elkore kaj nur se ĝi ne donas perturbon al la socio.

Ĉio escepte de la Absoluto estas malperfektaĵo. Ĉiu homo devas ĉiam severe introspekti pri si kaj neniam havi orgojlon, eĉ ne por momento.

Inter la nuntempaj homoj malfacile troviĝas eĉ unu, kies animo estas registrita en la Dia regno. Sed esence ĉiuj estas karaj filoj de Dio, kiuj povas brili, se ili sin poluras. Senlime poluru kaj senlime brilu.

Kio estas poluri? Tio estas introspekti kaj enlumiĝi. Ju pli fortan introspektivon homo havas, des pli rapide li povas sin poluri. Sen introspekto neniu povas plialtigi sian animon, eĉ se li estu dotita per plej bona

karaktero.

Atente observu la Naturon, la homojn kaj vin mem, kaj akiru enlumiĝon.

Kelkaj komplikaj frazoj aŭ malfacilaj vortoj lernitaj en lernejo tute ne taŭgas por ke homo elkomprenu la mistikan veron de la universo.

La universo estas granda lernejo kaj ĉio estas libro. Dum multaj nomoj sklave sin submetas sub mortinta scienco ekstereca, nur tre malmultaj okupiĝas je studado de vere vivanta scienco.

Ĉio krom la interneco estas nenio alia ol ilo aŭ rimedo. Multaj homoj sin alkroĉas nur al la ilo kaj ignoras la pliriĉigon de la eterna animo.

Se en ies interno speguliĝas afero de la ekstera mondo, tio okazas, ĉar tie ekzistas elemento kiu impresiĝas de ĝi.

Se homo provas bati per bastono iun, kiu staras alte supre, li ne sukcesas, ĉar la bastono ne atingas la celiton, dum ĉi tiu trankvile ridetas. Kontraŭe estas tute facile doni baton al iu, kiu staras malsupre. Eĉ la plej bagatela ago de superulo povas montriĝi serioza gravaĵo por tiu malsupre staranta.

Nur se homo tenas en si distingitan internon, eĉ tre malpurigita medio nenion al li influas, kvazaŭ tia tute ne ekzistus.

Dum profito aŭ malprofito materia estas nur provizora, tio spirita estas eterna.

La nuntempa lerneja sistemo, kiu celas encerbigi ekskulzive eksterecajn sciojn ja estas kompleta absurdaĵo laŭ spirita vidpunkto.

La 5-a parto

KIO ESTAS VERA "MI"?

Korpo estas tubo por spirita fluo

Korpo estas ujo por spirito. En diversaj okazoj lin okupas diversaj spiritoj kaj igas lin pensi diversajn aferojn kaj fari diversajn agojn kaj per tio lia memo kulturiĝas. Kiel nia korpo estas nutrata per la manĝaĵoj, kiujn ni prenas ĉiutage, tiel same nia animo nutriĝas per la spiritaĵoj kiuj senĉese envenadas.

La homa koro estas vere ŝanĝiĝema: iafoje ĝi estas tiel nobla kaj pura, ke mi mem pensas min kvazaŭ Dio; alian fojon ĝi estas plenigita per tiel abomena, fanatika kaj malnobla penso, ke mi mem tute malestimas min.

La homa korpo estas por tiel diri vivanta tubo, tra kiu fluas spirito aŭ staras. Se la tubo ne estas en ordo la spirito ne povas traflui ĝin. Ni do devas ĉiam teni la tubon

purigita por ne malhelpi la spiritan fluon.

Ofte oni eraras, pensante, ke la sama korpo estas la sama homo. La saman korpon okupas plej diversaj spiritoj laŭ la okazoj: jen eliras unu, jen eniras alia.

Ĉiu homo kun sama korpo havas pli ol tri fizionomiojn. Laŭ la spirito, kiu lin gardas nun, ŝanĝiĝas ne nur la fizionomio, sed ankaŭ sinteno kaj voĉtono.

Estas ankaŭ okazo, ke la saman homon okupas du spiritoj A kaj B miksite kaj kelkfoje laŭ diversaj proporcioj de la miksiĝo. Laŭ malsama spirito nature li ekhavas malsaman temperamenton kaj ricevas ankaŭ malsaman trakton de aliaj.

Kiel la radioelektro komuniĝas nur al la ricevilo aranĝita je sama ondolongo, tiel same responde al la teniĝo de homa koro venas al li ĝuste simpatiaj spiritoj.

Sufero kaj plezuro ne estas ekstere.

Kiam la animo estas komunikita al malalta, malvasta spirita regiono, tiam la koro ankaŭ estas iel malgranda, malvasta kaj malpura, sendemande kie troviĝas la korpo. Kontraŭe, kiam la animo komuniĝas kun alta kaj vasta spirita regiono tiam la koro estas agrabla kaj serena, sendemande la koron kaj tempon, en kiuj troviĝas la korpo.

En la okuloj de Dio tre supraĵaj estas pensoj de simpla unu homo, kiom ajn alte instruita li estu.

La homa korpo estas vivanta jaŝiro de Dispirito. Homo estas nur ilo por kompletigo de la universo. Homo kun maldensa spirito estas homo kun malgranda valoro. Afero, kiun homo faris kiam li estas kun maldensa Dispirito, ne eviteble montriĝas supraĵa. Kontraŭe, eĉ simpla, tute bagatela ago, farita kiam li estis en forta influo de Dispirito, portas neesprimeble profundan sencon.

Malgraŭ ĉio, homo devas adori Dion, respektive dediĉi sian plejebulon kiel ujo de Dio kaj labori por la kompletigo de la universo.

La plej altklasa ilo en la mondo estas la homo.

Ĉar homo estas la fina punkto de la spirita fluo, li ne rajtas pensi eĉ la plej bagatelan agon farita nur per sia propra kapablo.

La korpo estas la domo, la animo estas la loĝanto. Fariĝas bona laboro, kiam harmonias la domo kaj la homo.

Gardospirito, vic-gardospirito, malbona spirito

Kio estas la homo? Ĉi tio estas treege malfacila demando. Ekzemple primeditu: "Kio mi estas?" Kio ŝajnas memkomprenebla kaj tamen efektive estas neniel komprenebla, tio estas "mi".

Ĉar la spiritoj havas la econ tute libere kuniĝi aŭ disiĝi, ili estas finfine unu laŭ la vasta senco de la vorto, dum la malvasta vidpunkto ĉiu el ili estas aparta respektive. Tial oni povas diri, ke ekzistas neta "mi" laŭ unu vidpunkto sed samtempe tia ne ekzistas laŭ alia vidpunkto.

Ĉiam okazas kuniĝo aŭ disiĝo de spiritoj. Do, kvankam la primara animo de iu homo estas senŝanĝa, identa dum la tuta vivo, ne definitivaj estas liaj gardspiritoj.

La kuniĝo de la primara animo kun la primara gardspirito estas lia "memo", kaj la enhavo de la "memo" ŝanĝiĝas iom post iom. Principe la primara gardspirito apartenas al la sama linio kun la primara animo, sed kelkafoje okazas, ke provizore venas gardspirito el tute kontraŭa linio por korekti malbonan flankon de la primara animo.

Kiam la primara animo komplete harmoniiĝas kun la primara gardspirito el la Dia regiono, okazas la tiel nomata "unueciĝo de Dio kun homo". Kontraŭe, kiam lia primara animo harmoniiĝas kun gardspirito el la regiono de malbona spirito, (tiel nomata vic-gardspirito) tiam li eniras en staton de malbono.

Multaj homoj estas iafoje en la stato de bono kaj aliffoje en la stato de malbono. Sed troviĝas ankaŭ tiuj, kiuj estas ĉiutage kaj tutan tempon en la stato de bono pro sindisciplinado, dum aliflanke troviĝas, kvankam ne ofte, tial homoj kiuj restas dum tuta vivo en la stato de malbono pro degeneriĝo de la primara animo.

La primara animo de iu homo estas parto de iu Dispirito sendita al la fizika mondo. Kiam ĝi enloĝiĝas en la homan korpon, ĝi estas kondensita, kiel la semo de planto.

Kiel sama semo bone ekĝermas kaj sane kreskas aŭ ne laŭ la tempo kaj loko de enteriĝo, tiel same unu sama parto de Dispirito estas submetita sub la regadon de diversaj medioj de la fizika mondo siatempaj.

La primara animo estas komparebla kun mastro de unu hotelo kaj tiel same la korpo kun la domo.

La gardspirito estas la gvidanto de la mastro. Ĝi originale loĝas en la spirita mondo kaj faras gravan instrukcion kaj gvido al la mastro pro diversaj kialoj ankoraŭ unu difinita spirito konstante loĝas en la hotelo. Ĝin oni nomas vic-gardspirito.

La primara gardspirito estas la patro de tiu mastro aŭ la origino, el kiu li elvenis. La rilato inter la gardspirito kaj la memo (primara animo) similas al la rilato inter la cerbo kaj la nervosistemo. La plej

neta praorigino de la memo estas la primara gardospirito kaj por inverse diri, la etendiĝo aŭ branĉiĝo de la primara gardospirito estas la memo. Do oni povas diri, ke la primara gardospirito estas memo.

Kvankam ŝajnas, ke sufiĉas nur unu primara animo por unu homo, ordinare homoj krome havas gardospiriton kaj vic-gardospiriton, eĉ kelkaj vic-gardospiritajn iufoje.

Dum la gardospirito estas bonkvalita, ĉar ĝi esence estas helpanto al la primara animo, la vic-gardospirito estas malbona spirito, kiu nur klopodas tenti la primaran animon en malbonon.

La vera memo estas la primara animo de ĉiu homo, eĉ de plej malbona homo, estas naskita el la pura spirito de la universo, do ĉiu respektive havas sian brilon. Tamen intertempe pro diversaj kaŭzoj ĝi perdas sian brilon kaj forpuŝata de la malbona spirito, kiu entrudis sin en la korpon, fine enfermiĝas en malvasta angulo tiel ke ĝi ne povas dece elmontri sian kapablon. Anstataŭ ĝi ofte la malbona spirito okupas la mastrecon ĝis tia grado, ke la gardospirito, nome la vartistino jam nenion povas helpi.

La memo (primara animo) estas parto aŭ eldividiĝo de iu ĉielulo (primara gardospirito) aŭ iu spirito. Ĝi harmoniiĝas kun la vic-gardospirito pro la neceso de

la fizika monda vivado kaj aliflanke ĝi harmoniiĝas kun la gardospirito por eniri en la spiritan ordon.

Ĝenerale la memo kiu aperas kiel unu personeco estas en tiu stato de harmoniiĝo kun la gardospiritaj.

La memo harmoniiĝas ne ĉiam kun difinitaj gardospirito kaj vic-gardospirito. Iafoje ĝi povas harmoniiĝi kun pluraj gardospiritaj. (Kvankam ne eble kun spiritoj sen ia rilateco.) En tiu okazo unu korpo sendube elmontras plurajn personecojn.

Ĉar estas diversaj gradoj de la harmoniiĝo, konsekvence aperas diversaj statoj de la elmontriĝo personeca.

Kiam la memo harmoniiĝas kun iu spirito, tiam ekzistas nur unu "memo" por ambaŭ, memo kaj la spirito, nur dum la daŭro de la harmoniiĝo. La memo, antaŭ la harmoniiĝo kun la spirito, restas nur nebule en la memoro.

Tiel tre vigle okazas, harmoniiĝo kaj disiĝo de spiritoj, sed tamen nur tre malofte okazas, ke stultulo subite fariĝas granda saĝulo aŭ granda verulo abrupte falas en stultulon, ĉar la pli- aŭ malpliriĉiĝado de la animo okazas nur iom post iom laŭ difinita ordo. (malofte, sed ne neniam).

La mondo progresas pli kaj pli delikaten kaj detalen kaj tial ju pli antikve, des pli grandan laboron povis elmontri unu individua persono.

La rilato inter la primara gardospirito kaj la primara animo similas tiun inter centra butikoj kaj agentejoj. Kiam okazas vigla helpo de la primara gardospirito, tiom pli grandiĝas la primara animo; sekve la konduto kaj la fizionomio de tiu persono fariĝas pli noblaj, riĉaj kaj graciaj, ol en ordinariaj tagoj.

Kiam oni dissendas sian primaran animon al diversaj direktoj, (kiam homoj estas en aflikto, lia animo disflugas kaj malgrandiĝas,) tiam konsekvence la aktiveco de la korpo ankaŭ malgrandiĝas.

Estas diversaj kaŭzoj de pli- aŭ malpligrandiĝo de la forto de la animo. Kiel la tirforto de iu magneto proporcias al ĝia originala forto, tiel la homa animo povas montri pli aŭ malpli grandan potencon proporcie al sia forto. (Kvankam la magneto konstante havas samam forton) la homa animo mem povas iugrade pli- aŭ malpligrandigi sian forton. Kiam la animo sentas ĝojon, tiam ĝi pli grandiĝas aŭ fortiĝas kaj inverse.

Tial homo devas atenti kiel ne turmenti sian koron sed teni ĝin ĉiam en plena trankvileco.

Ĉiu penso venas el la spirito. Homo malĝojas, kiam lin okupas malĝoja spirito; homo ĝojas, se lin regas ĝoja spirito.

En homa korpo kunloĝas almenaŭ tri spiritoj diversaj. Kvankam la homa primara animo kaj la gardospirito estas esence bonaj,

la ceteraj vic-gardospiritoj estas malbonaj. Kiam ĉi tiuj lastaj ekhavas potencon por disponi la korpon, la korpo neeviteble enfalas en malbonon. Sed la primara animo kaj la gardospirito ĉiam batalas kontraŭ ili por superregi la korpon. Jen kial la homo havas konsciencan kaj koron kontraŭan al ĝi. La homo naskiĝis en ĉi tiu mondo kun la destino, ke ĝi klopodu por la triumfo de la konscienco dum la vivo.

Dum la vic-gardospiritoj ĉiam avide serĉadas la ŝancon kontentigi sian deziron. Se homo montras eksterordinare fortan seksdeziron aŭ avidemon pri manĝaĵo, tio evidente estas kaŭzita de la furiozo de la vic-gardospiritoj. Krome, koleremo, deprimiĝemo, suspektemo---ĉiuj ĉi tiuj emoj venas de vic-gardospiritoj. Do, homo devas ĉiam introspekti por kontroli ilin.

Sed tre forta vic-gardospirito iaforte malhelpas eĉ la de Dio dotitan aktivecon de la primara animo kaj utiligas por si la homan racion aŭ la konsciencan. Ĉiukaze homo devas nepre subteni la vic-gardospiritojn dum la vivo por proprigi al si la temperamentojn de la ĉielregno.

La korpo estas ujo. En ĝi loĝas ne nur la primara animo, sed ankaŭ spirito, kiu gardas la vivtenon kaj aktivecon de la korpo, kaj kiu tamen kapablas nur fari tion sed nenion pli. Do, ĝi estas nomata vic-gardospirito.

Se ĝi progresas, liberigita de la korpaj katenoj kaj de la egoisma karaktero, ĝi rajte nomiĝas gardospirito, senigita je la prefikso "vic" .

Mi menciis tri kategoriojn, nome: primara animo, gardospirito kaj vic-gardospirito. Sed tiu distingo laŭ proksimuma, malpreciza konsidero. Oni povas distingi en kiom ajn multe da kategorioj, se oni ŝatas precizecon.

Post ĉio, ĉar la korpo estas sub rekta regado de la vic-gardospirito, ĉiu korpa percepto venas rekte de la vic-gardospirito. Laŭ la grado de puriĝado de la vic-gardospirito ŝanĝiĝas ankaŭ la grado de lia korpa percepto.

Por ke tereca spirito (vic-gardospirito) progresu al ĉieleca spirito ĝi devas plenumi eksterordinaran disciplinadon. Se en la mondo naskiĝas diversaj malfeliĉoj kaj bonaj homoj spertas multajn malfacilaĵojn, tio okazas iusence kiel fajro kaj akvo, per kiuj la vic-gardospiritoj sin forĝu kaj purigu por dece sin levi ĉielen.

La vic-gardospirito estas kristaliĝo de memalkroĉiĝo. Ĝi estas egoismo mem. Ĝia penso estas malvasta kaj estas ĉiam bazita sur memprofito. Ĝi konsideras nur en la kadro de parteto kaj provizoreco. Kaj neniu homo estas sen vic-gardospirito.

La karakterizaĵo de la vic-gardospirito

estas ekstrema egocentreco. Mi ne scias pri aliaj homoj, sed mi tion asertas per la konstanta introspektado pri la pensoj el mia propra vic-gardospirito.

Homo, regata de la vic-gardospirito, ĉiam bedaŭras nur sian malsuperecon al alia kaj tute ne havas la grandanimecon juste juĝi aferon nete laŭ ĝia valoro. Tial li tuj volonte, ne pro justeco, aprobas aferon, kiu ŝajnas porti profiton al li, kaj simple evitas tion, se ĝi iel kontraŭas lian bonon, senkonsidere pri ĝia vera esenco.

La plejparto de nuntempaj homoj estas regataj de la vic-gardospirito kaj sekve, al mi ŝajnas, aprobas la egoismon, kiel naturon de homo.

Homo sub vic-gardospirito malŝatas, ke aliaj superas lin en iu ajn, eĉ plej bagatela afero. Li tamen tuj flatas iun, kiun la publiko jam respektas, ĉar tio sendube portos profiton al li.

Pro ekstrema egoismo li tuj suspektas aŭ ĵaluzas je plej bagatela konduto de alia persono. Suspekto, ĵaluzo, rankoro — ĉiuj ĉi tiuj sentoj estas el la vic-gardospirito. Ili preskaŭ ne troviĝas en la Dia regno, mi kredas.

La homa korpo, por tiel diri, estas tre grava ponto, tra kiu dioj el la ĉielo malsupren venas sur la teron kaj diversaj spiritoj en disciplinado sin levas ĉielen. La gardospirito de ponto estas "mi", dum la gardospirito

estas gasto malsupren venanta el la ĉielo kaj
la vic-gardospirito estas gasto supren iranta
de la tero.

“Mi” ricevas diversajn instruojn kaj
poluradon de ambaŭ gastoj.

Estas bonaj spiritoj kaj malbonaj
spiritoj. Eĉ inter malbonaj spiritoj troviĝas
iuj, kiuj havas grandan potencon.

(daŭrigota)

